vundojn kaj okulajn malsanojn per surmetado de kruda ranofemuro sur la korpolezon. Dum tio la plerocerkoido povas senpere infekti la homon. Sendepende de la infektomaniero la homo fariĝas ĉiam la "**dua** intera gastiganto" kadre de la evoluciklo de tiu ĉi cestodo – kun la sekvo, ke la parazito troviĝas en "sakstrato" kaj vivocikla fino, ĉar la homo ja ĝenerale ne estas natura predo por iu specio el la finaj gastigantoj.

### Patogenezo kaj klinikaj signoj

Tute egalas, ĉu la infekto okazis per la procerkoido (senpera ingesto de la eta ciklopa krustulo) aŭ per la plerocerkoido (el infektitaj amfibioj), la sparganoj preferas la subhaŭtan kaj muskolaran histon kiel ejon de lokiĝo. Tie ili atingas konsiderindan longon (8 ĝis 36 cm) kaj larĝon (ĝis 1 cm).

La parazitoj aktive rondmigradas en la histo kaj kaŭzas ĥronikajn recidiv-inflamajn ŝvelaĵojn. Ilia natura vivodaŭro en la homo estas pluraj jaroj. Ofta kaj tipa formo estas la **okula sparganozo**, kiam la cestodolarvoj lokiĝas en la ĉirkaŭokula histo.

### Diagnozo

Konfirmo nur post eltranĉado kaj identigo de la spargano mem. Serologiaj pruvmetodoj ne ekzistas. Preskaŭ ĉiam aperas modera eozinofilio.

### Adreso de la aŭtoro

*Prof. Dr. Rüdiger SACHS*
*Vor dem Brückentor 3*
*DE – 37269 Eschwege*
GERMANIO
<IsaeSachs@aol.com>

### Priaŭtora informo

La aŭtoro instruis ĉe la Veterinara Fakultato *Kabete* de la Universitato Najrobo/Kenjo (Orienta Afriko) la fakon "Nutraĵa Higieno", kaj estis docento pri parazitaj zoonozoj kaj malsanoj de sovaĝaj bestoj.

Unu el la plej konsiderindaj viandhigienaj kondiĉoj ĉe hejmaj kaj sovaĝaj bestoj por juĝi la viandon taŭga aŭ netaŭga kiel homa nutraĵo estis ties infekto pro cestodolarvoj.



# La ĉefaj kaŭzoj de spirita mizero kaj materialisma riĉeco

*Jerzy LECHOWSKI*

La materialisman mizeron de la plej multaj homoj kaŭzas
- la spirita mizero de la riĉuloj,
- la materialisma riĉeco de la kapitalistoj.

La spirita mizero de la riĉuloj rezultas el ilia
- mensa limigo
- kaj ilia kurta vido.

La taskoj de la intelektularo estas
- larĝigi la mensajn horizontojn de la riĉuloj, kiuj vidas nenion krom materialisman riĉecon,
- doni la feliĉon precize difineblan per la formulo:

$$S = \frac{zS\gamma}{l}\sqrt{\frac{\mu}{\varepsilon}}$$

- Elementoj de la feliĉo: La suprajn valorojn ni interpretu jene:
- z - nombro de agoj, kiujn ni ŝatas, volas fari, pensi, senti,
- S - multaj vojoj kondukantaj al celo,
- $\gamma$ - kuraĝeco en problemsolvado,
- l - distanco ĝis celo aŭ dezirata objekto ($l = v \cdot t$),
- v - rapideco en cel-atingado,
- t - tempo, en kiu ni atingas celon
- $\mu$ - emocia penetrebleco, danke al kiu nia emocia vivo iĝas pli riĉa kaj ni kapablas ĝoji pro tio, kion ĝi donas,
- $\varepsilon$ - intelekta penetrebleco, kiu ebligas iusence antaŭ vidadon de la estonteco (ofte vidata tro nigre) – tute nebezone.

Multan malfeliĉon oni povas eviti
- se la intelektularo inklinus propagi kaj klarigi la esencon de la filozofia enhavo de la formulo por la feliĉo.

El la formulo por feliĉo efikas la metodo danke al kiu oni povas
- atingi intencitan celon,
- atingi la bezonatan amon de proksimulo.

Intelektuloj povas ludi grandan rolon kiel defendantoj de naciaj specifaj heredantoj de universalaj elementoj en la kultura kaj civilizacia tradicio:
- ili ne devas kontentiĝi per proklamado de frazoj,
- la homaro ŝuldas sian evoluon al la nuntempa teĥniko, kiu progresas helpe de striktaj matematikaj formuloj.

La kaŭzoj de ĉiu malbono
- ĝeneraligas la relativecan teorion aplikatan en la etik-morala sfero (ĉion oni povas argumenti pere de la ĝenerala leĝo de spitemo – tezo/antitezo kaj sintezo),
- la dialektiko baziĝanta sur etike malpermesataj disputistoj,
- nekonvene uzataj metodoj de "Neŭrolingvistika Planado" (NLP).

La NLP-metodon prilaboris la konata psiĥiatro prof. *Erikson*, celante:
- kuraci psiĥe malsanajn homojn, sed nuntempe oni uzas ĝin por stultigi homojn mense sanajn.

La disputistojn oni uzas por
- falsigi la veron,
- ridindigi politikajn kontraŭulojn,
- venki en balotado.

NLP- metodojn oni nun uzas por
- ruze trompi homojn,
- vendadi diversspecajn asekurojn,
- instrui asekur-agentojn en specialaj kursoj pri diversaj reklam-teĥnikoj,
- influadi la subkonscion de homoj,
- instigi al aĉeto de falsaj "kosmetikoj", "nutraĵoj" kaj "medikamentoj", ofte malutilaj.

Helpe de NLP
- oni instigas al diversaj monpruntoj, preni kreditojn
- faras ĉion kun la celo, ke la riĉuloj povas kolekti grandajn monsumojn por la propra bankokonto.



La riĉuloj
- formas nur ĉ. 2% de la homaro, dum ili posedas ĉ. 90% de la homara riĉeco,
- ĉiam pligrandigas sian riĉecon,
- ilin karakterizas tamen escepta spirit-mizero.

La riĉuloj evidente ne scias:
- ke la plej bezonata por ili ne estas la materialisma riĉeco, sed la amo de proksimuloj,
- ke ili estas pro tio kompatindaj homoj,
- ke oni ne povas akiri amon se oni malkompate ekspluatas siajn proksimulojn.

La universala leĝo de spitemo
- "Ĉiu efiko, kiun rezultigas iu kaŭzo, estas direktata kontraŭ ĉi tiu kaŭzo, kiu ĝin rezultigas",
- estas senco de negativa retrokuplado, kiun oni utiligas en teĥniko-stirado.

El la leĝo de spitemo rezultas, ke nur per metodo
- sistema,
- pacienca kaj saĝa
- oni povas ŝanĝi la situacion en kiu la homaro troviĝas.

La ĉefa rolo de la intelektularo estas:
- sisteme atentigi ĉi tiujn malfeliĉulojn, kiuj "ne vidas kion ili faras",
- indiki la fakton, ke la riĉuloj faras (per daŭra avideco) damaĝon ne nur al aliuloj, sed al si mem.

Danke al la "ekzaktaj sciencoj" progresas
- la sciencoj,
- la kulturo,
- la scio pri la mondo kaj homoj,
- la filozofio (de amo, de saĝeco).
- Tamen okazas ankaŭ ekspluatado de homoj pere de homoj senseblaj por preciza pensado kaj absorbitaj pro nepensa avideco.

Ĉi tiuj agresemaj kaj spirite mizeraj homoj
- neniigas sin mem kaj la tutan homaron,
- pereigos do ankaŭ scienculojn kaj eltrovintojn, danke al kiuj la riĉuloj fariĝis riĉuloj. En tio konsistas la leĝo de spitemo.

La inteligentularo devas

- atentigi la riĉulojn pri (ĝenerale deviga en la naturo) la leĝo de spitemo kaj kiel saĝe uzi ĝin,
- direkti sian intelekton al la naturaj leĝoj kaj prilabori leĝojn harmonie kaj unuanime kun la naturo,
- ne krei iujn fikciajn, ofte malutilajn leĝojn.

Por efike preventi proksimiĝantan universalan katastrofon oni devas

- utiligi precizecon de la rezonado,
- ĝuste taksi la intuicion de multaj homoj,
- averti homojn antaŭ la eldiroj de disputistoj,
- ekkoni NLP-metodojn kaj ĝuste ilin apliki.

Sukceso, tre bezonata nun al homoj, estas eliro el la krizo

- ekonomia,
- etika / morala,
- mensa,
- filozofia.

Por atingi iu ajn sukceson oni devas

- scii kiel tion fari,
- kredi ke oni ĝin atingos,
- havi la volon atingi ĝin kaj komenci agi tiucele.

Estis jam konataj en la historio la sociaj sistemoj, el kiuj

- iuj baziĝis precipe sur sklava laboro,
- aliaj precipe sur la kredo,
- kaj ankoraŭ aliaj precipe sur la sciado.

Baldaŭ, sendube, venos tiaj pli bonaj tempoj en kiuj

- sciado, kredo kaj laboro reciproke kompletiĝos.

**Noto**: La vizion de ĉi tiuj tempoj oni montras en la interreta paĝo: www.realizatorzy.prv.pl.

**Adreso de la aŭtoro**

*Prof. Jerzy* LECHOWSKI
*ul. Siewierska 16A m.23*
*PL 02-360 Warszawa*
POLLANDO

<jlech@o2.pl>

**Priaŭtora informo**

La aŭtoro edukiĝis kiel inĝeniero pri elektroniko (*Dr.sc.nat.* ĉe Varsovia Politeĥniko), profesiis en biofiziko (kun prefero de psiĥokibernetiko) kaj fariĝis OProf. Dr. habil. inĝ. ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino.



# Psiĥolingvistikaj kritikoj pri la *Hilberg*-a antaŭsupozo por la "vera pensmaŝino"

*Hiroshi* NAGATA

## Enkonduko

La artikolo de *Hilberg* (SR 4/2010) pri "vera pensmaŝino" estas malfacile deĉifrebla, precipe pro manko de informoj kiujn li devis esti doninta al legantoj bone kompreni ties enhavon. Multe pli klaraj informoj nepras ne nur rilate al la esploro kiun li aktuale plenumis pri la analizoj de tekstoj, sed ankaŭ pri la raciigo kiun li faris por egaligi tiujn analizojn kun la funkciado de neŭronaj retaĵoj de la homa cerbo. La manko de tiaj informoj malfaciligas al ni konvinkiĝi, kial la analizoj, antaŭ ĉio, koncernas la pensadon.

Klare estas, kontraste, ke lia esploro starigas sin surbaze de la antaŭsupozo ke "ĉiu pensado baziĝas sur lingvo" (*Hilberg*, 2010, p. 4). La nuna recenzo provas ĵeti dubojn, el la psiĥolingvistika vidpunkto, al tiu ĉi antaŭsupozo: unuflanke rigardante ĝin kiel validan kaj aliflanke kiel nevalidan. Kaj ni konkludas, ke ne prava estas lia nocio ke la analizo de teksto trafas la procezon de homa pensado.

## Flanko 1: la antaŭsupozo estas valida

Supozu, kiel *Hilberg* kredas, ke pensado estas eksplikebla se ni analizas ĉiujn frazojn aperintajn en teksto. Se tiu ĉi nocio estas valida, necesas tiam konsideri, ĉu teksto fakte indikas la procezon de pensado. Teksto konsistas el frazoj, kiuj siavice konsistas el la sinsekvo de vortoj. Tamen ĝi ne rekte spegulas la pensadon, des pli la procezon de pensado. Tio, kion la teksto en si spegulas, estas nur la rezultoj, kiujn produktas la pensado. Aŭtoroj transformas sian pensadon ne rekte en frazojn. Ili turnas seriozan konsideron plejeblan al la taŭgeco de ĉiuj vortoj kaj frazstrukturoj, anstataŭigante iujn vortojn per aliaj, formetante frazojn neadekvatajn el la teksto kaj anstataŭigante ilin per aliaj pli adekvataj. Tiujn ĉi reviziojn la aŭtoroj faras ie ajn en la teksto kaj ripetas ĝisfunde, ĝis kiam ili sentas ke ĉio statas bonorde. Revizioj tiaj ĉi okazas ofte dum la verkado de teksto. Tio indikas, ke la teksto aperinta en presita formo ne reflektas la procezon de pensado mem, sed la produktaĵon belforme meti-